

Kurt Kretschmann,
La feliĉo de l' floroj
tradukita de Manfredo Ratislavo

Ĉe l' domo inter floroj en
Trankvilo kuŝis mi,
Aŭdante, kiel ili jen
Parolis inter si.

Parolis ili inter si,
Tre fajne lispis, ke
Ekaŭdis mi el tio ĉi,
Ke ili ĝojas tre.

„Amikojn havas multajn ni,
Vizitas oni nin.
Ĉu iu vizitatas pli?”
Demandis ili min.

„Rigardu la insektojn vi.
Da ili granda ar'
Fluganta estas ĉirkaŭ ni
Pro serĉo de nektar'.

Flirtadas papiloj en
Trembrilo ĉirkaŭ ni,
Aŭdiĝas grilo-kanto jen
Samkiel melodi'.”

...

Ĉiela blu' kaj blank' de la
Nubaro super ĝi, -
Sufiĉe havas floro da
Plezur' en tio ĉi.

*Traduko de la Germana poemo "Das Glück der Blumen" de KURT KRETSCHMANN (*1914-03-02) en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, *1938-11-04) en 2005-06.11.*

MR-438-1 / Arg-316-638 (2005-06-12 13:30:40)

Sinjoro Kurt Kretschmann vivis multajn jarojn en la banloko Bad Freienwalde en la iama Germana Demokrata Respubliko (nun federacio lando Brandenburg/Brandenburg de Germanio). Nun li loĝas en la urbo Eberswalde en Brundenburgo en maljunulo-hejmo. Li verkis krom multaj natur-poemoj kune kun s-ro Rudolf Behm (Talweg 17, D-16225 Eberswalde, Germanio) ankaŭ la libron "Mulch total" ("Ĝardeno terkulturado nur per natura grundotegado").